

Adriaen (François) Valéry,

Kristana kanto

tradukita de Karl Vanselow

Al Dio, la lumo de nia espero,
 Aŭdiĝu la kanto de nia ador',
 Al Dio ni preĝu kun pia sincero,
 Ke benu kaj ŝirmu nin Lia favor'.

Li montru la vojon, Li gvidu la sorton
 Al suna estonto tra ĉiu nubbar',
 Al niaj animoj Li donu la forton
 Por venki malamon de malamikar'.

Al Dio ni preĝu kun kredo kaj pio,
 Al Dio ni fidu kun kora ador'.
 Leviĝu ĉielen la melodio
 De nia kantado por Lia honor'.

*Traduko de la Nederlanda poemo "Wilt heden nu treden" de ADRIAEN (FRANÇOIS) VALÉRY (Adrianus Valerius, *1575 – †1620-01-27) en Esperanton de KARL VANSELOW (*1877-03-20 – †1959-12-28).*

Arg-528-1050 (2010-03-24 10:05:00)

Tiu ĉi esperantigo troviĝas en la poem-libreto "Nia Lingvo Esperanto, Elektita poezio por deklamo kaj kanto, Dua kajero de la unua serio, Dua Ardesia-eldono", verkita kaj eldonita de Karl Vanselow, sur la paĝo 64. Sub la teksto estas indikita: (Verkita laŭ la nederlanda melodio "Wilt heden nu treden". Originalan melodion kreis Rolf W. Althoff.) - Pri la aŭtoro Karl Vanselow legeblas informoj en http://eo.wikipedia.org/wiki/Karl_Vanselow.